
平成２５年度　唐丹小校報／NO34／２月５ 日(水)




(住所)　唐丹町字小白浜３１４　　　TEL55-2105

隣にある中学校校舎の解体がはじまった。大型の重機でコンクリートを少しずつ取り除いていく。それを廊下から見ていると中学年の男子児童が「なんか残酷だ。」と言った。３年前大きな力によって、ぼろぼろになった小学校校舎を思い出しながら聞いた。(西村)

# Mevo

**Informilo de la elementa lernejo Tooni**

**N-ro 34, la 5an de februaro 2014**

**Adreso : Japanio, Iŭate-ken, Kamaiŝi-ŝi, Tooni-ĉoo, Koŝirahama 314**

**Telefono : 0193-55-2105**

**Fakso : 0193-55-2107**

Oni komencis malkonstrui la konstruaĵon de la mez-lernejo. Per grandaj maŝinoj iom post iom oni forprenas la partojn. Unu lernanto diris : « Kruele ! » Mi rememoris, ke ankaŭ la konstruaĵo de la elementa lernejo fariĝis kvazaŭ ĉifono pro la granda natura forto.
(Niŝimura Fumiaki, lernejestro)

* La konstruaĵo de la mezlernejo estis difektita de la tertremo

## Elektiĝis nova estraro de la lernanta asembleo

Prezidanto : Uemura Kaito (en la 5a lernojaro)
Vic-prezidantoj : Sasaki Maju (en la 5a lernojaro),
Hino Nacuki (en la 4a lernojaro)
Sekretarioj : Kimura Ŝoodai (en la 5a lernojaro),
Nakaibajaŝi Masato (en la 4a lernojaro)

La 31an de januaro okazis elekto de la novaj estraranoj de la lernanta asembleo. Kvin lernantoj kandidatiĝis kaj esprimis sian opinion entuziasme pri tio, kiel plibonigi la lernejon. Aplaŭdate de la lernantoj en la 6a lernojaro, ili estis elektitaj kaj dividis la rolojn. Ĉiuj esperas, ke ili kunlaboros bone. La venonta jaro estos la 4a jaro ekde la katastrofo, do ili ne nur danku al la subtenantoj, sed ankaŭ mem kreu novan agadon por pli bona lernejo.

Jen estas salutoj de la elektitoj :




**Uemura Kaito** : Mi kandidatiĝis por ke ĉiuj havu bonan kaj ĝojan tempon en la lernejo. Mi planos, por ke ĉiuj havu ridojn.



**Sasaki Maju**: Mi laboris kiel sekretario en la lasta jaro. Ĉi-jare mi celis unu etapon pli altan. Mi laboros por ke ĉiuj observu la lernejajn regulojn kaj salutu unu al la aliaj kun ridetoj.



**Hino Nacuki** : Mi volas, ke ĉiuj lernantoj estu amikaj. Mi alparolos al solecaj amikoj. Mi ne kalumunios aliajn. Ni estu ĉiam amikaj.



**Kimura Ŝoodai**: Mi kandidatiĝis, pripensante la rolon de la 5a-lernojaruloj. Mi volas fari nian lernejon plena de ridetoj kaj amikeco. Mi estos la unua, kiu salutos kaj prenos rubaĵojn.



**Nakaibajaŝi Masato**: Mi volas fari la lernejon plena de ridetoj kaj vigleco. Kiam mi trovos iun kun malĝoja mieno, mi alparolos al li/ŝi. Mi volas fari la lernejon bonega.

## Konkurso pri ĵurnaloj



Unu el la hejmtaskoj dum la vintra ferio estas fari ĵurnalon. Ankaŭ en tiu ĉi jaro kolektiĝis tiel bonaj ĵurnaloj, ke instruistoj havis malfacilan tempon por juĝi. En la respektivaj lernojaroj unu plej bona kaj du-tri bonaj ĵurnaloj estis elektitaj.

## Ekzercado por ŝnursaltado

Konkurso de ŝnursaltado okazos inter 10:40 kaj 12:15 la 20an de februaro. Ĉiuj lernantoj ekzercis sin en la gimnastikejo. Ni atendas viziton de gepatroj kaj geavoj al la konkurso.



## Saluto de la lernejestro (la 2an de februaro)

**Pri *Secubun* : Preparu vin por la vova lernojaro !**

La 3a de februaro, hieraŭ, estis nomata *secubun*. Ĝi signifas la tagon por dividi la sezonojn. En Japanio troviĝas kvar sezonoj: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. La 3a de februaro estis la tago, kiu dividas vintron kaj printempon.

En tiu ĉi jaro, la 4a de februaro estas la komenca tago de printempo, la 5a de majo estos tiu de somero, la 7a de aŭgusto estos tiu de aŭtuno kaj la 7a de novembro estos tiu de vintro.

Ankaŭ nun ni purigas la domon antaŭ la nova jaro. Same homoj en la malnova tempo, puriginte la domon kaj forpelinte malbonaĵojn el la hejmo, volis havi novan sezonon, novan printempon. Homoj opiniis, ke grenoj, pizoj kaj salo havas magian forton por forpeli malbonaĵojn kaj komencis forĵeti pizojn en *secubun*, kaj ankaŭ nun ni forĵetas pizojn en tiu tago. Ni venku malbonan kutimon, ekzemple malfruan ellitiĝon, malfruan enlitiĝon, longan televidspektadon, maldiligentecon ktp, kaj preparu nin por la nova lernojaro.